# KIEL DIRI TRIMANIERE

(10-A VIDEOLECIONO)

Celata publiko:

Lernintoj de baza kurso de Esperanto.

**Antaŭtaksita kvanto de la videoj: 14**

**Periodeco de la publikigoj: ĉiusabate.**

Georgo donacis al Rita projekciilon de holografiaĵoj, celante “viziti”, kune kun ŝi, la sep mirindaĵojn de la Antikva Mondo.





Georgo donis al Rita, kiel donacon, unu holografiilon, por ke ili rigardu vid-al-vide la sep mirindaĵojn de la Antikvo.

Georgo faris donacon al Rita per projekciatoro de hologramoj. Lia intenco estis tio, ke ili miru, kvazaŭ rekte, la sep mirindaĵojn de la Antikva Epoko.

1. **Kion Rita prenis kiel donacon?**
2. **Kion holoprojekciilo aŭ holoprojekciatoro projekcias? Ĉu lumbildojn 3D?**
3. **Por kio Georgo aĉetis la projekciilon aŭ holografiilon?**
4. **De kiu tempo estas la sep mirindaĵoj?**
5. **Ĉu povas esti, ke vi vivis en la Antikva Tempo aŭ Antikvo aŭ Antikveco? Se jes, kiam? Kio eble vi estis tiam?**
6. **Se vi povus retrovojaĝi en la tempo, kiun tempon kaj kiun lokon vi ŝatus viziti?**

Unue ili staris antaŭ la Piramidoj de Egiptio. Rita diris, ke ŝi estas tre ĝoja pro tiu multflanka projekciaĵo.



Komence la paro stariĝis fronte al la Piramidoj de Egiptujo. Tiam Rita asertis, ke ŝi multe ĝojiĝis antaŭ tiu bildo 3D.

En la komenco la geamatoj restis starantaj antaŭe de la piramidoj de la egipta regno. En tiu momento, Rita sciigis, ke ŝi estas tre feliĉa fronte al tiu luma pluredra kreaĵo.

1. **Ĉu vi jam vizitis la famajn pluredrojn de Egiptio aŭ Egiptujo?**
2. **Kiu el la tri plej famaj piramidoj de Gizo en la egipta regno estas la plej alta? Ĉu Keopso (aŭ Ĥeopso), Ĥafro (aŭ Ĥafreno) aŭ Mikerino (aŭ Micerino)?**
3. **Ĉu por vi la egiptaj piramidoj estis nur tomboj de faraonoj, aŭ ili servis por io plia? Se jes, por kio?**
4. **Kial la piramidoj de Gizo rezistas al la tempo ĝis hodiaŭ?**
5. **Kiuj planis kaj kiuj konstruis la piramidojn de Egiptio?**

Due vidiĝis la PENDĜARDENOJ DE BABILONO, faritaj de la reĝo Nebukadnecaro, em 605 a.K., kiel donaco al lia edzino, la reĝino Amitisa, en la urbo Babilono, en Mezopotamio.



Tuj poste antaŭ ili ekaperis la PENDANTAJ ĜARDENOJ DE BABILONO, starigitaj de Nebukadnecaro, kiu per ili faris donacon al sia edzino, en la tempoj de Mezopotamio.

Sekvante, elaperis inter ili kaj la projekciilo 3D la PENDĜARDENOJ DE BABILONO, konstruitaj en 605 a. K., de la reĝo Nebukadnecaro la 2-a, donace al la reĝino Amitisa, lia edzino.

1. **En kiu tempo aŭ epoko estis konstruitaj aŭ starigitaj aŭ faritaj la pendĝardenoj aŭ pendantaj ĝardenoj de Babilono?**
2. **Por kio kaj al kiu Nebukadnecaro konstruis tiun mirindaĵon?**
3. **Ĉu ankoraŭ hodiaŭ ekzistas tiaj ĝardenoj?**
4. **Kiom da ĝardenistoj certe estis necesaj aŭ estis bezonaj por akvumi tiujn pendĝardenojn en ĉiu tago (aŭ ĉiutage)?**
5. **Se eblus al vi veturi tra la tempo, ĉu vi ŝatus viziti Mezopotamion kaj baniĝi ĉe la riveroj Tigriso kaj Eŭfrato?**

Poste vidiĝis hologramo pri la Statuo de Zeŭso en Olimpio. Tiu mirindaĵo detruiĝis en incendio okazinta en Konstantinopolo, en 470 p. K.



Daŭrigante, estis vidata holografiaĵo de la Statuo de Zeŭso, la dio de la dioj kaj de la homoj, en Olimpio. Tiu skulptaĵo malkonstruiĝis en brulo havinta lokon en Konstantinopolo, en la jaro 470 p. K.

Postvenante, videblis 3D-lumbildo figuranta la Statuon de Zeŭso en Olimpio. Tiu ŝtonkreaĵo perdiĝis en brulado estinta en Konstantinopolo, en 470 p. K.

1. **En kiu jaro okazis la incendio, kiu detruis la statuon de Zeŭso?**
2. **Kie okazis tiu brulo?**
3. **Kial tiu statuo ne estis asekurita kontraŭ incendio?**
4. **Kiom kostus la asekuro de tiu mirindaĵo, se ĝi ankoraŭ ekzistus hodiaŭ?**
5. **Se vi povus skulptigi grandan statuon en via urbo, kiun vi figurus per tia konstruaĵo?**

Daŭrigante, aperis antaŭ ili la Templo de Artemiso en Efezo. Tiu mirindaĵo estis konstruita kaj rekonstruita multajn fojojn, ĝis ĝi estis plene detruita ĉirkaŭ en la jaro 262 p.K., dum la barbara invado de la gotoj.



En la sinsekvo de la prezentado elaperis al ili la Templo de Artemiso en Efezo. Ĝi estis ade starigita kaj restarigita dum multaj fojoj, ĝis ĝia plena ruiniĝo dum la jaro 262 p.K., okaze de la okupacio de la barbaraj gotoj.

En la daŭrigo lumvidiĝis al ili la Templo de Artemiso en Efezo. Ĝia konstruado kaj rekonstruado okazis multfoje, ĝis okazis ĝia tuta detruado en 262 p. K., far la gota tribo, kiu barbare invadis Efezon.

1. **Kiel aperis antaŭ la paro la Templo de Artemiso?**
2. **Kiomfoje tiu mirindaĵo estis konstruita kaj rekonstruita?**
3. **En kiu jaro ĝi estis ruinigita por ĉiam?**
4. **Pro kio ĝi estis detruita?**
5. **Ĉu vi povas kredi, ke tiu monumento de la Antikveco povos esti facile replikita en la estonteco, pere de grandaj presmaŝinoj 3D?**

En la sinsekvo grandioza tomba konstruaĵo brilis antaŭ la geamatoj: ĝi estis lumanta reproduktaĵo de la Maŭzoleo de Halikarnaso, konstruigita de la reĝino Artemisa la 2-a, inter 353 kaj 351 a. K., tie, kie hodiaŭ estas Turkio, por restigi la mortintaĵojn de ŝia edzo kaj frato, la reĝo Maŭzolo.




Tuj poste impona tombego lumis antaŭ la geamindumantoj: temis pri brilanta reproduktiĝo de la Maŭzoleo de Halikarnaso, kiun konstruigis la reĝino Artemisa la Dua, el Kario, de 353 ĝis 351 a. K., en la hodiaŭa Turkujo, por entombigi la mortrestaĵojn de sia edzo kaj frato, la reĝo Maŭzolo.

Tuj sekve majesta tombodomo leviĝis brile antaŭ la amparo, lume figurante la Maŭzoleon de Halikarnaso, kiu estis konstruita sub ordono de la monarkino Artemisa la 2-a, en la jaroj 353-351 a. K., en la regno kie modernepoke estas Turkujo, por sepulti la kadavron de sia edzo kaj frato, la reĝo Maŭzolo.

1. **Kio estis la Maŭzoleo de Halikarnaso?**
2. **Kial maŭzoleo havas tiun nomon?**
3. **Kial la reĝino Artemisa la 2-a konstruigis tiel grandan kaj imponan konstruaĵon omaĝe al sia edzo kaj frato?**
4. **Ĉu vi jam antaŭpagis por la entombigo de viaj mortrestaĵoj, pere de asekura entrepreno?**
5. **Kiam vi forpasos, kie vi volas, ke via korpo estu enterigita? Ĉu en la teron? En tombokelon? En familian ĉerkujon? En maŭzoleon? Aŭ ĉu vi preferas, ke viaj mortintaĵoj estu kremaciitaj? Aŭ vi tute ne zorgas pri tio?**

Alvenante tuj poste, elstariĝis la Koloso de Rodiso, statuo el bronzo, 33 metrojn alta, konstruita en Grekujo, ĉirkaŭ en 330 a. K., por omaĝi al la dio Helioso (la Suno). Ĝi estis detruita 50 jarojn poste, pro tertremo, kiu ruinigis la urbon Rodiso.



Tuj sekve alvenis kaj leviĝis la Koloso de Rodiso, bronza koloso alta je 33 metroj, skulptita en Grekio, proksimume en la jaro 330 a. K., omaĝe al la dio Helioso. Ĝi detruiĝis post 50 jaroj, kaŭze de tertremo ruiniginta la urbon Rodison.

En la sekvo elvenis la Koloso de Rodiso, statuo farita el bronzo. Ĝi havis 33 metrojn da alto kaj estis levita en Greklando, pli-malpli en 330 a. K., kiel omaĝo al la dio Helioso. Ĝi staris dum 50 jaroj, ĝis okazis seismo, kiu detruis ĝin, kaŭzante la ruiniĝon de la urbo Rodiso.

1. **Kiomalta estis, aŭ kiom da metroj havis la Koloso de Rodiso, aŭ alta je kiom da metroj ĝi estis?**
2. **Kio kaŭzis la ruiniĝon de la koloso de Rodiso?**
3. **Por kio tiu koloso estis skulptita?**
4. **Kiun nuntempan koloson vi konsiderus inda je la titolo de mirindaĵo, en la moderna epoko?**
5. **Omaĝe al kiu vi skulptus aŭ skulptigus unu kolosan statuon en la hodiaŭo?**
6. **Por vi, ĉu Esperanto estas konsiderinda ia lingva koloso de la homaro? Ĉu ĝia kreinto - D-ro Zamenhof - estis ia koloso de la homaraj kulturo kaj saĝo?**

Lastvice lumis la Lumturo de Aleksandrio. Ĝi estis marmora kaj mortera konstruaĵo, starigita ĉirkaŭ en 280 a. K., en la egipta urbo Aleksandrio, de Sostrato, la arkitekto el la greka urbo Knido. Ĝi longedaŭris, malgraŭ multaj tertremoj, sed ekdetruiĝis en la 4-a jarcento.





Fine estis la luma vico de la Lumturo de Aleksandrio. Ĝi estis levita el marmoro kaj mortero, de la greka arĥitekto Sostrato el Knido, proksimume en 250 a. K., en la urbo Aleksandrio (Egiptujo). Ĝi transvivis multajn terskuojn, sed ekmalkonstruiĝis en la jarcento IV.

Laste lumis la Lumturo de Aleksandrio. Estis marmoro kaj mortero en ĝia konstruado far la arkitekto Sostrato el Knido (en Grekujo), pli aŭ malpli en 250 a. K., en Aleksandrio (urbo de Egiptio). Ĝi eltenis multajn seismojn, tamen ekiĝis ruina en la 4-a jarcento.

1. **Kion pli brile donacis Aleksandrio al la homaro: ĉu la lumo de sia lumturo, aŭ la lumo de sia biblioteko?**
2. **Oni diras, ke la egiptoj intencas rekonstrui la Lumturon de Aleksandrio. Kion vi pensas pri tio?**
3. **Se tio okazos, anstataŭ marmoro kaj mortero, kiun alternativan materialon la nuntempaj arkitektoj povos utiligi en ĝia konstruado?**
4. **Se la tiamaj maristoj de Mediteraneo, kiuj sin orientadis per tiu lumturo, scius, ke ĝi estonte estos unu el la 7 mirindaĵoj de la Antikva Mondo, kion ili eble farus, por konservigi ĝin por ĉiam?**
5. **Por vi, ĉu la antikva Biblioteko de Aleksandrio meritus esti taksita kiel la 8-a mirindaĵo de la Malnova Mondo?**





**Por vi, kiu alia monumento de la Antikva Mondo devus aparteni al tiu listo da mirindaĵoj?**
**Kiuj monumentoj estas, en via opinio, la 7 mirindaĵoj de la Moderna Mondo?**
**Kaj inter la nemateriaj havaĵoj de la homaro, ĉu Esperanto estas taksinda kiel unu el la mirindaĵoj de la Nuntempo?**
**Kiuj aliaj nemateriaĵoj meritus esti konsiderataj modernepokaj mirindaĵoj?**

**Kiu el la sep mirindaĵoj de la Antikvo ankoraŭ ekzistas?**
**Se vi povus vojaĝi tra la tempo, kiun mirindaĵon de la Antikvo vi ŝatus vidi fronte-al-fronte?**

**Post ĉirkaŭ 20 jaroj certe la kameraoj de holografio montros spektaklojn, kongresojn, sportaĵojn kaj ceterajn eventojn dumokaze aŭ realtempe, miniaturigitajn en via ĉambro, plenajn je detaloj kaj anguloj. Kiun eventon vi volos spekti per tia tekniko en la estonteco?**
**Se vi povus eniri en kapsulon de projekcio en la estontan tempon, en kiun tempon vi ŝatus veturi? Por vidi kion?**

# Organizis: Josenilton kaj Madragoa

